



# esperanto

## Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

n° 111 - vintro 2017/2018

### federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

### nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

### prezidanto

Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

### baza kotizo por aliĝo

(kun la gazeto) : 6€

ĉeko al :

"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la **kasisto**  
Nicole Lafitte  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
nlpolecamp@gmail.com

### sekretario

### redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain  
61 Montée du Castelar  
83460 Taradeau  
06 42 19 68 51  
p.vilain83@orange.fr

limdato por sendo de  
publikotaĵoj por la venonta n°  
31-a de marto 2018

bonvolu sendi al la supra retadreso

><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

### Vorto de la Prezidanto

Feliĉan novan jaron al ĉiuj esperantistoj kaj iliaj familianoj!  
Sanon kaj sukcesojn en viaj Esperantaj agadoj.  
Ni tre bone laboris dum 2017, sed nun ni devas prepari nin por plu kaj pli labori en 2018! Ni esperu, ke la nova jaro signifos por ni progreson de nia lingvo en nia Provenca regiono.  
Ankoraŭ bonan jaron al ĉiuj!

*Pierre Oliva*

### Nova federacia TTT-ejo



Ĉu vi jam vizitis la tute renovigitan retejon de nia federacio ? Se ne, tuj faru tion kaj malavare distrompetu la informon al ĉiuj viaj samideanoj, amikoj kaj konatuloj! Por vidi ĝin, alklaku **ĉi tie**, aŭ vidu la adreson en la maldekstra kolofono, se vi ricevis nur la paperan gazeton.

### Ne forgesu pagi la aliĝkotizon - 6 € - al Espéranto-Provence

por la jaro 2018, ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto,  
*Nicole Lafitte*. (aliĝilo aldonita al tiu ĉi gazeto)

**Dankon !**

### ***N'oubliez pas de payer la cotisation de 6 € à Espéranto-Provence***

*pour l'année 2018, soit par l'intermédiaire de votre groupe local,  
soit directement à notre trésorière, Nicole Lafitte.*

*(bulletin d'adhésion joint à ce journal)*

**Merci !**

### Federacia membro-kunveno / Assemblée générale de la fédération

dimanĉon la 25-an de februaro - je la 14-a 30

***Les Issambres (Var) - Résidence Vacanciel du Val d'Esquière***

kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno

En la sekvaj paĝoj, bonvolu legi la moralan, agadan kaj finanĉan raportojn por la jaro 2017. Estas aldonitaj sur apartaj paĝoj la kunvokilo kaj voĉdona rajtigilo (en okazo de via neĉeesto).

## Federaciaj raportoj - 2017

### 1 - Morala raporto (*Pierre Oliva*)

2017 estis en nia federacio, kiel kutime, jaro kun mullte da laboro. Pro tio mi dankegas ĉiujn klubojn, kiuj proponis kursojn, staĝojn, renkontiĝojn, publikajn okazaĵojn, ktp. Tio montras, ke nia federacio vivas.

Bedaŭrinde, laŭ mia vidpunkto, la rezultoj de tiuj laboroj ne ĉiam respegulas la esperatan sukceson.

Pro tio, ekde nun kaj atendante nian venontan ĝeneralan kunvenon, mi petas vin pripensi tion, kion ni povus inventi kaj fari por vivigi nian federacion, ĉu rilate la nombron de partoprenantoj, ĉu rilate la popularecon de nia lingvo. Kaj tio okazu ne nur inter ni, sed ni ankaŭ provu enkonduki novajn kaj originalajn aktivaĵojn kaj alvenigi ilin al sukcesa rezulto.

Mi opinias, ke tio estu nia tre grava projekto, por ke nia federacio plifortiĝu.

### 2 - Agada raporto (*Pascal Vilain*)

#### 1 – Membraro

*Espéranto-Provence* havis 93 membrojn je la 31a de decembro 2017.

39 pagis al UFE

el ili: 8 pagis nur al *Espéranto-France*

12 pagis la grupan kotizon (*Marseille* kaj *Gap*)

10 pagis al *Espéranto-France* kaj la Federacio

9 pagis al *Espéranto-France* kaj sia klubo

22 pagis nur al la Federacio

32 pagis nur al sia klubo

#### 2 – Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

##### 2-1 deklaritaj asocioj

04 - **Manosque** - E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque): 11 federaciaj membroj

05 - **Gap** - *Espéranto-Gap*: 5 federaciaj membroj

13 - **La Roque-d'Anthéron**: *Espéranto-La Roque*

13 - **Marseille**: 7 federaciaj membroj

ttt-ejo : <http://esperanto.marseille.overblog.com>

13 - **Miramas**: G.E.M. (*Groupe Espéranto Miramas*)

83 - **Saint-Raphaël**: *Espéranto-Club Saint-Raphaël* : 19 federaciaj membroj

83 - **Le Beausset**: *Espéranto – Le Beausset*: 10 federaciaj membroj

84 - **Avignon** - K.E.C.A. (Kultura Esperanto-Centro de Avinjono)

##### 2-2 antenaj grupoj de *Espéranto-Provence*

13 - **La Ciotat**; 84 - **Carpentras**; 84 - **Orange**

#### 3 – Administro

estraranoj (3)

prezidanto: *Pierre Oliva*

sekretario: *Pascal Vilain*

kasisto: *Nicole Lafitte*

aliaj komitatanoj (6)

*Monique Arnaud, Marc Gallardo, Franz Mimmersheim, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez*

gazetrespondeculo: *Pascal Vilain*

retejrespondeculo: *Franz Mimmersheim* ĝis oktobro – *Thierry Spanjaard* poste por la nova retejo

reprezentanto de nia federacio ĉe *Espéranto-France*: *Pascal Vilain*

#### membrokunveno

Ĝi okazis en *Les Issambres* la 5an de marto, okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno.

19 partoprenintoj + 15 senditaj rajtigiloj

#### komitatkunsidoj

> marto 5: *Les Issambres* (post la membrokunveno)

> oktobro 6: Marsejlo (ĉe *Thierry Spanjaard*)

> novembro 19: *Le Beausset* (post la Kultura Semajnfino)

#### 4 – Instruado

##### - kursoj

en *Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon, Manosque*

##### - staĝoj

> marto 4/11 - *Les Issambres*: Mediteranea Esperanto Semajno (zorgas pri ĝi *C. Graissaguel* kaj *M. Prezioso*)

> novembro 18/19 - *Le Beausset* (83): Kultura Semajnfino (zorgas pri ĝi *P. Oliva* kaj *N. Lafitte* - kursoj gviditaj de *Mari-Roza* kaj *Pascal Vilain, Patrick Lagrange*)

##### - ekzamenoj

> majo 21 - *Marseille*: FEI-ekzamenoj

#### 5 – Informado – komunikado

> Nova versio de nia retejo «*Espéranto-Provence*»

estis lanĉita en oktobro, danke al la helpo de *Emmanuelle Richard* kaj *Axel Rousseau*, el *Espéranto-France*; zorgas pri ĝi *Thierry Spanjaard*, *Philippe Combot* kaj *Pascal Vilain*. Egajn dankojn al *Franz Mimmersheim*, kiu efike kaj regule zorgis pri la antaŭa retejo.

> E.K.E.M. (*Manosque*): deĵorado en la Domo de la Asocioj la unuan kaj trian sabatojn, ĉiumonate dum la tuta tago ekde la 9a45.

> marto 5/12/19/26 kaj aprilo 23 - *Marseille*: radio-elsendo kun *T. Spanjaard* pri Esperanto je Radio *RJM*

> septembro 3 - *Fréjus*: «Forumo de la asocioj»

> septembro 9 - *Manosque*: «Forumo de la asocioj»

> septembro 10 - *Marseille*: «*Vivacité*» Forumo de la asocioj

## 6 – klubaj eventoj

> januaro 7 - *Le Beausset* (83): tri lernantoj ricevis sian diplomon pri unuagrada Eo-ekzameno ; sekvis reĝkuka festo

> januaro 10 - Marsejlo: enmanigo de la FEI-diplomoj al 2 sukcesintoj en la unuagrada ekzameno.

> januaro 18 - *La Ciotat*: membro-kunveno + reĝkuka festeto

> januaro 21 - *Manosque*: ĝenerala kunsido

> januaro 29 - *Saint-Raphaël*: reĝkuka festo + membro-kunveno

> junio 11 - *Saint-Raphaël*: tradicia printempa pikniko (en *Correns*)

> junio 25 - *Avignon*: kultura tago kaj pikniko en *Mallemort*, post vizito de la kastelo *Lourmarin*.

> julio 2 - *Saint-Raphaël*: komuna manĝado kaj distra posttagmezo en *Les Issambres*

> decembro 16 - *Saint-Raphaël*: Zamenhof-tago

> decembro 17 - *Avignon*: 39-a Zamenhof-tago kun prelego de *Monique Arnaud* pri «La vivo de *Lidia Zamenhof*», sekvata de skeĉoj, poemoj, rakontoj, kantoj.

## 7 – movadaj eventoj

> aprilo 10/14 - *Bouresse* - Kvinpetalo: Pedagogia seminario; partoprenis *Nicole Lafitte* kaj *Pierre Oliva*.

> majo 25/28 - *Mandres-les-Roses* (94): Kongreso de *Espéranto-France*. Partoprenis *Monique Arnaud* kaj *Renée Triolle*.

> julio 22/29 - «102-a Universala Kongreso de UEA» en Seulo (Koreio). Partoprenis *Maria* kaj *Christian Castillon*.

> aŭgusto 5/13 - *Baugé* - Kastelo Gresiljono: Festa Semajno por infanoj kaj familianoj. Partoprenis *Roselyne Favier* kun sia nepino.

> aŭgusto 14/20 - *Plouézec* (22): 21-a Internacia Renkontiĝo. Partoprenis *Nicole Lafitte* kaj *Pierre Oliva*.

## 8 – kulturaj eventoj

> februaro 20 - *La Ciotat*: Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

> marto - *Le Beausset*: renkontiĝo kun la asocio «*Trait d'Union*»

> marto 2 - *Saint Bonnet*: prelego de *Monique Arnaud* pri la verko de *Greta Franclet* «*Nul en langues?... Plus jamais!*»

> marto 8 - *La Ciotat*: Internacia Virina Tago; partopreno de la klubo en ekspozicio, kun aliaj asocioj

> marto 18 - *La Ciotat*: prelego de *Duncan Charters* pri «La «*Latinos*» kaj la hispana lingvo en Usono»

> marto 30 - *Marseille*: prelego de *Chuck Smith* pri Amikumu

> aprilo 1 - *La Ciotat*: Festivalo de Dividita Poezio; partoprenis *Renée Triolle*

> aprilo 4 - *Gap* : prelego de *Monique Arnaud* pri Esperanto

> aprilo 5/7 - *La Ciotat*: salono «Edukado kaj Teritorioj»; budo de *Espéranto-La Ciotat*

> majo 13 - *La Ciotat*: «Eŭropa Festo»; budo de *Espéranto-La Ciotat*

> junio 2/30 - *Sainte-Tulle*; ekspozicio proponita de EKEM pri «*Langues et espéranto*»

> junio 2 - *Sainte-Tulle*: prelego de *Monique Arnaud* pri la verko de *Greta Franclet* «*Nul en langues?... Plus jamais!*»

> junio 11 - *Correns*: prezentado de nia lingvo + kurseto, proponitaj de la klubo de *Saint-Raphaël*

> junio 16 - *Sainte-Tulle*: prelego de *Patrick Lagrange* pri la historio kaj funkciado de Esperanto.

> julio 2 - *Gap*: «*Fête de la Paix*»; partoprenis *Monique Arnaud*.

> aŭgusto 14 - *Callian* (83): omaĝo al *Honoré Bourguignon*; partoprenis *Mari-Roza* kaj *Pascal Vilain*

> septembro 09/10 - *Embrun*: «*Foire Bio Génépi*» ; partoprenis *Monique Arnaud*.

> septembro 8/14 - *Le Beausset*: ekspozicio «*Voyage et espéranto*» kun pentraĵoj de *Pierre Oliva*.

> septembro 23 - *Rimbaud* (05): «*Alp'ternatives*»; partoprenis *Monique Arnaud*.

> oktobro 30 / novembro 14 – Parizo, UNESKO-sidejo: Ĝenerala Konferenco 2017; partoprenis por ILEI *Monique Arnaud* kaj por UEA *Renée Triolle*.

> decembro 9 - Parizo: 3a grada ekzamensio – organizis ĝin *Renée Triolle*

> decembro 11 - Parizo, ĉe la UNESKO-sidejo: solena evento konklude je la jaro Zamenhof; partoprenis *Renée Triolle* kaj *Monique Arnaud*

## 9 – diversajoj

- > bedaŭrinde forpasis tri membroj el nia federacio: *Marie Bourgeois*, *Roland Accomiato* kaj *André Loisel*.
- > Membroj de *Espéranto-Marseille* registris en *Toulouse* novan version de la lernmaterialo «*Méthode 11*».
- > Aliaj membroj de *Espéranto-Marseille* produktis filmon kadre de la konkurso «Teo kaj Amo».
- > *Ilona Koutny* kaj pola paro gastis ĉe *Monique Arnaud* kaj *Renée Triolle*.
- > *Thierry Spanjaard* havis kontaktojn kun esperantistoj en Centra-Azio, kie li somere vojaĝis.
- > *Alain Rémy* biciklis dum la printempo kaj somero tra 10 Eŭropaj landoj, kie li havis kontaktojn kun kelkaj

esperantistoj.

- > *Monique* kaj *Laurent Prezioso* renkontiĝis en la somero kun samideanoj el *Châtel-Guyon*.
- > partopreno de *Pascal Vilain* en la poezia konkurso: «Poezio el ĉiuj ĉieloj». Poemo lia aperis en la kvara antologio de la konkurso.
- > partopreno de *Nicole Lafitte* kaj *Pierre Oliva* en la ĝenerala kunveno de «*Espéranto-Info*», en julio.

## 10 – venontaj okazaĵoj

- > februaro 24 / marto 3 - *Les Issambres*: Mediteranea Esperanto-Semajno
- > novembro 2018 - *Le Beausset*: datoj, kursoj kaj distra programo decidotaj

## 3 - Financa raporto (*Nicole Lafitte*)

bilan financier année 2017			
recettes		dépenses	
cotisations	552,00	édition et envoi gazette	371,00
cotisations Eo-France	232,00	dépl. Paris pour Eo-France P. Vilain	32,00
don S-ro Loisel	310,00	animations Châteauneuf-le-Rouge	80,00
dons	10,00	examens FEI	42,00
		timbres	10,00
		documents, photocopies	20,00
<b>stage Le Beausset</b>		<b>stage Le Beausset</b>	
cotisations	1150,00	achats	703,00
		nuitées	460,00
vente de livres	77,00	déplacements pour achats	22,00
		déplacement P. Lagrange	81,00
		déplacement P. Vilain	29,00
<b>total stage : 1227,00</b>		<b>total stage : 1295,00</b>	
		<b>(bilan stage : déficit : 68,00)</b>	
		<b>excédent au 31/12/2017</b>	<b>481,00</b>
<b>total</b>	<b>2331,00</b>	<b>total</b>	<b>2331,00</b>

## Kultura Semajfino en *Le Beausset*

Dudeko da lernemuloj partoprenis en la kutima aŭtuna staĝo en *Le Beausset*, la 18an kaj 19an de novembro.

Laŭ sia lingvonivelo, ili sekvis la kursojn de *Mari-Roza Vilain* (komencantoj/progresantoj), de *Pascal Vilain* (praktikantoj) kaj de *Patrick Lagrange* (scivolantoj pri la Universo). *Patrick* sendis "raporteteton" (*tion li skribis*) pri sia babila rondo... sed ĝi estas tiom "egegega" (*tion opinias la red.*), ke la gazeta enpaŝiganto devige decidis aldoni ĝin kiel suplementon al la PDF-versio (*vidu post la 8a paĝo*). Ricevintoj de la nura papera versio povas peti de la redaktoro la pluajn paĝojn.



## El la regionaj asocioj

### 05 - Espéranto-Gap



#### Rainer Kurz en Altaj Alpoj

Germana esperantisto, Rainer Kurz loĝas parte en Stuttgart, parte en Sidnejo, en Aŭstralio. Li kutimas veni en Francion pro prelegoj. Ĉijare gastigis lin Monique Arnaud.

Jen ligo por scii pli pri li:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Rainer\\_Kurz](https://eo.wikipedia.org/wiki/Rainer_Kurz)

Ĵaŭde vespere, tuj kiam Rainer Kurz, elbusiĝis en Saint-Bonnet, ni vizitis Sabinan, germandevenan, kiu intruas la germanan lingvon en la Supera lernejo Dominique Villars en Gap.

Ni interkonsentis pri la prezentadoj de Rainer. Antaŭ du jaroj, la unua klaso ricevis de mi informojn pri Esperanto, do Rainer povis paroli pri la migrantoj. Kun la alia klaso, li parolis pri Esperanto. Kvardekon da lernantoj li alparolis.



Rainer Kurz  
en la Supera  
lernejo

Poste ni vojaĝis sur belega suna vojo al mia ekslernejo. Tie ni tagmanĝis kaj la flegistino tuj parolis germane, kaj ĝuis tion fari!

Posttagmeze dum tri horoj, Rainer renkontis pli junajn lernantojn, 11/12 jaraĝajn. Laŭ instigo de la instruisto, ili faris demandojn unue en la angla, poste en la franca, aŭ pri Esperanto aŭ pri Aŭstralio. Estis tre interesa renkontiĝo kun sume alia kvardeko da lernantoj.



Monique  
entuziasme  
respondas  
la demandojn  
de la lernantoj.

Mi promesis al Rainer renkonti alian instruiston pri la germana lingvo kaj finfine, en restoracio en apuda urbeto, ni partoprenis en kutima monata renkontiĝo de Germanoj, kiuj vivas en nia regiono. Tiel, pli ol deko da plenkreskuloj ekaŭdis aŭ pli aŭdis pri Esperanto.

Feliĉe, Rainer estas bonsana kaj laborema, tiel li plenumis la antaŭviditan programon. Li eĉ trovis tempon sabate matene por ekskursi piede al belega lago ne tro for de mia domo. Poste mi veturigis lin al Grenoblo kaj vere lastminute sukcesis kontakti Pascale V. en Liono por akcepti lin. Mi tre ŝatus, ke li revenu alian jaron... ĉiam estas novaj lernantoj!

raportis Monique Arnaud



### 13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

#### Prelego de Chuck Smith

La 7an de decembro, en " L'Équitable Café ", Chuck Smith, fondinto kaj ĉefa teknika oficisto de Amikumu, apo por trovi proksimajn lingvopartnerojn, prelegis pri «La modernaj komunikaj rimedoj serve al la lernado de lingvoj».

Jen lia prezentado de la prelego:

"Oni malofte prenas tempon por pripensi pri la evoluo de teknologio, do mi volas, ke ni rigardu la mondon, en kiu Zamenhof finis sian vivon en 1917 kaj komparu la vivon de tiu tempo al la nuntempo en 2017. Efektive, nia komunikado plene ŝanĝiĝis en ĉiuj aspektoj: novaĵoj, legado, verkado, kinarto, lingvo-lernado. Krome, ankaŭ la sociaj rilatoj multe ŝanĝiĝas, same kiel la maniero ekhavi novajn amikojn kaj resti

en kontakto kun la jamaj.

Venu kun mi en tempovojaĝo tra la lastaj 100 jaroj kaj eksci, kiel vi povas plej bone uzi ĉiajn rimedojn por plej bone komuniki kaj lerni lingvojn en la nuna mondo. Vikipedio, Duolingo, Amikumu... donas al lingvoj novan dimension!"



Chuck Smith, dum alia prelego en  
Marsejlo la 30an de marto 2017



## Les espérantistes ont fêté la « Zamenhoftago »

La « Zamenhoftago », jour qui rend hommage à l'initiateur de la langue internationale « Esperanto », a réuni comme chaque année, des membres du club d'espéranto de Saint-Raphaël et des amis venus d'autres communes de la région. C'est dans la rue raphaëloise qui porte le nom du docteur Zamenhof que les participants, rassemblés autour de Denise Loisel, la présidente de l'association du secteur, ont fêté l'anniversaire, retraçant l'histoire des 130 ans d'existence de la langue présentée au monde en 1887, le centième anniversaire du décès de son initiateur, disparu en 1917, et le 63<sup>e</sup> anniversaire de la résolution de l'Unesco du 10 décembre 1954 à Montevideo.

### Espéranto et Unesco

Ce jour-là, en effet, l'assemblée générale de l'Unesco acceptait une résolution qui notait les résultats obtenus au moyen de l'espéranto dans les échanges intellectuels internationaux et pour le rapproche-

ment des peuples, constatait que ces résultats correspondaient aux buts et idéaux de l'Unesco et autorisait son directeur général à suivre les expériences concernant l'utilisation de l'espéranto pour l'éducation, la science et la culture. Après ces quelques rappels, les participants se sont retrouvés dans un restaurant du bord de mer pour un déjeuner convivial et festif durant lequel l'usage de la langue internationale qui les réunit était de mise.

Les projets du club ne manquent pas : assemblée générale en février avec partage de la galette des rois, stage international aux Issambres du 25 février au 3 mars, sans oublier les cours hebdomadaires donnés chaque mercredi de 15 à 17 heures, à la maison des associations, rue de la Soleillette à S-Raphaël.

Contact : 04.94.95.66.18 ou 04.94.83.06.88.  
Site de la Fédération espérantiste pour la région PACA : [esperanto-provence.org](http://esperanto-provence.org)



Une date toujours suivie par les adhérents de l'association. (DR)

Artikolo de Var-Matin pri la Zamenhof-festo, kiu okazis en Saint-Raphaël la 16an de decembro



## 84 - Centre Culturel Espéranto d'Avignon

La 17an de decembro 2017, la klubanoj de la Kultura Esperanto Centro de Avinjono festis la 38an Zamenhofan tagon en "La Souvine".



Matene prelegis  
*Monique Arnaud*  
pri la "Vivo  
de Lidia Zamenhof"  
laŭ libro  
de *Wendy Heller*.

*Lidia*, la plej juna el la tri infanoj de *L.Zamenhof*, naskiĝis en 1904.

Ŝi eklernis Esperanton en 1913 por havi permeson akompani la gepatrojn en Berno (Svislando), kie U.K. estis okazonta. Pli poste, post la forpaso de la patro, ŝi decidis daŭrigi lian laboron. De 1925 ĝis 1930, *Lidia* interesiĝis pri la Bahaa kredo. Ŝi komencis instrui Esperanton laŭ la *Cseh*-metodo ekde 1930-1931. Ŝi vojaĝis en multajn Eŭropajn landojn. Oni pensas revii, kiam oni scias, ke foje *Lidia* instruis Esperanton al centoj da novaj lernantoj...

La lasta vojaĝo al Ameriko, en septembro, 1937 estis sukcesa, tiom por Bahaanoj, kiom por Esperanto.

Sed pro ĵaluzo kaj neglekto pri la dokumentoj necesaj por la restado en Ameriko, ŝi reiris al Pollando, kaj ŝia vivo finiĝis en koncertejo.

Post la prelego, tre bongustan festan manĝon ni havis kune en la restoracio de la centro "Souvine".

Fine, distra programo – kantoj, skeĉoj, rakontoj, poemoj – estis prezentita de la klubanoj.



*En sia raporto, Rose-Marie ne longe skribis pri la mirinda laboro de ĉiuj klubanoj, kiuj zorgis pri la teatraĵo : ili ne nur bonege rolludis, sed ankaŭ zorgis pri la kostumoj, la maskoj... Gratulojn al ĉiuj ! (n.d.l.r.)*

Ni estas malmultaj, do, eĉ se ni deziras daŭrigi la principon de jara renkontiĝo, ni estas devigataj ŝanĝi la konceptadon de tiu manifestado. Ni atendas viajn proponojn, viajn ideojn. Ni esperu !

*raportis Rose-Marie Quintin*

## L'espéranto à l'UNESCO

(comptes-rendus de R. Triolle en français, pour UEA, et de M. Arnaud en espéranto, pour ILEI).

Pour clôturer l'année Zamenhof, la Délégation de Pologne auprès de l'UNESCO s'est démenée pour que la cérémonie ait lieu dans cette grande maison, à Paris. Lundi 11 décembre, quatre cent personnes ont assisté aux différentes conférences. Le président de séance était Renée Triolle qui a respecté à la minute le temps imparti. Espéranto-France et *Universala Esperanto-Asocio* ont financé et organisé cette matinée: exposition, affiches, livres et café ont accueilli les participants ou visiteurs, filtrés par Monique Arnaud.

L'Ambassadrice de la délégation Polonaise à l'UNESCO, SE Krystyna Zurek (en français), la Directrice du Patrimoine, Mechtild Rossler (en espéranto, à notre grande surprise), Frank La Rue, ADG pour la Communication (en anglais) auquel Stephan Mac Gill, vice-président de UEA a répondu en anglais, avant le discours de Wanda Zaleski-Zamenhof, arrière-petite-fille de Zamenhof (en espéranto, bien sûr) ont ouvert cette matinée. Deux blocs de conférences, en français puis espéranto ont présenté les différentes facettes du mouvement :

**"Pourquoi l'espéranto s'est imposé?"** par Sébastien Moret, linguiste et slaviste à l'université de Lausanne; non pas pour ses qualités linguistiques intrinsèques mais pour son humanisme.

**"L'espéranto face à la mondialisation"**, par Jean-Claude Lescure, historien à l'Université de Cergy Pontoise qui parle du "traumatisme du Quai d'Orsay" qui n'a pas changé de position depuis un siècle!

Guilherme Fians, doctorant brésilien à l'université de Manchester a présenté **"L'espéranto au présent et face à son avenir: une communauté et ses moyens de communication"**.

Après la pause, Chuck Smith, élu "espérantiste de l'année" commentait **"les outils modernes de communication au service de l'espéranto"**, alors que Trezoro Huang Yinbao (entrepreneur chinois) présentait ce qui a fait le "buzz" de l'année: la parution en espéranto du "Courrier de l'UNESCO", et appelait à soutenir par des abonnements et des dons cette belle initiative, car le "Courrier" distribué à tous les ambassadeurs de Chine dans le monde fait connaître non pas "la langue mondiale" mais le mot "espéranto".

Retenu par la remise du Prix Nobel de la Paix, Giorgio Novelle, ambassadeur d'Italie en Norvège et Islande, avait enregistré son message en espéranto, ce qui a étonné Son Excellence Krystyna Zurek.

Félicitations à tous ceux qui ont œuvré pour que l'espéranto continue à tracer sa voie à l'UNESCO.



*de maldekstre dekstren: P. Voltaire, E. Desbrières, D. Loison, B. Despiney, F. Lo Jacomo, R. Triolle, R. Maertens, J.P. Boulet, M.S. Julian, M. Arnaud*

La Ĝenerala Konferenco UNESKO 2017 okazis de la 30a de oktobro ĝis la 14a de novembro en Parizo. Ekde la unua tago «svarmis diligentaj abeloj», kiuj provis malkovri ne nur la homojn kaj la lokojn sed ankaŭ la novan taskon. Por la unua fojo, ILEI havis 5 delegitojn same UEA, do ni estis tre videblaj des pli ke estis nur unu NRO - pri dislekcio - kiu varbis samtempe. Rapide niaj delegitoj konsciis en kiu maniero, kun kiuj homoj ili pretas rilati. Tiel kelkaj varbis en salono, kie sidas la delegacioj, aliaj en salono, kie kunvenas NROj kaj certe, ĉiuj el ni en koridoroj, vicoj, restoracio kaj kokteloj. Malfacilas diri, kiom da homoj ni kontaktis sed gravas diri, ke tiuj homoj ofte havis kontaktojn kun pluraj el ni. Bedaŭrinde kelkaj delegacioj ĉiam alvenis last-minute kaj estis malfacile renkonti ilin. Ĉi tiun jaron, pli ol 200 ŝtat- kaj NRO-representantoj petis parolvicon kaj inter la lastaj UEA. *Rakoen Maertens* brile alparolis homojn.

<https://esperanto-france.org/representation-a-l-unesco>

Same kiel en 2015, la ĉefaj temoj rilatis al la celoj 2015-2030: daŭripova evoluigo, klimataj ŝanĝiĝoj kaj iliaj konsekvencoj, altkvalita edukado por ĉiuj kun bone trejnitaj instruistoj, protektado kaj promociado de kultura diverseco kaj de monda heredaĵo, rajtoj sin esprimi, protektado de ĵurnalistoj.

Same kiel en 2015, kiam eblis, ni provis prezenti al homoj dokumenton en ilia gepatra lingvo. Niaj dokumentoj estis tradukitaj en 16 lingvojn. La angla lingvo estis uzita proksimume 100-foje, la franca 55-foje; la representantoj de kelkaj delegacioj uzis ambaŭ lingvojn.

Daŭre pri lingvoj, ni aŭdis 23 fojojn la araban, 15 fojojn la hispanan, 6 fojojn la rusan kaj 2 fojojn la ĉinan. La reprezentantoj surpodie foje uzis sian gepatran lingvon, tiel ni aŭdis 4-foje la portugalan, po 1 kelkajn aliajn lingvojn kaj poemon en la maori lingvo! Finiĝis la mandato de *Irina Bokova*, ĝenerala direktorino de UNESKO, kaj ni havis la honoron saluti kaj danki ŝin. Mi sukcesis enmanigi al ŝi la bulgaran version de nia ILEI dokumento.

Vizitu la TTT-ejon:

<https://fr.unesco.org/generalconference/39>



## A noter sur votre agenda

### dans notre fédération

**février 24 / mars 3 - Les Issambres**

*Méditerranée Esperanto-Semajno*

*(bulletin d'adhésion joint au n° d'octobre)*

**printemps - Marseille:** le Forum des Langues du Monde, annoncé dans le n° 109 pour le 1er octobre 2017, est reporté au printemps.

*(à confirmer)*

### en France

**Baugé (49) - Château de Grésillon**

**avril 20-28** - PRINTEMPaS, cours intensifs

**avril 27-28** - Examen international d'espéranto CECRL

**mai 9-3** - Rencontre chorale d'Interkant

**mai 9-3** - ReVe, Rencontre Végane

**juillet 9-27** - Cours d'espéranto marathon pendant 18 jours

**juillet 9-16** - Échanges de savoirs et de savoir-faire

**juillet 16-21** - Semaine spéciale avec visites touristiques

**juillet 21-27** - Conférence Internationale d'Espéranto d'OSIEK «Espéranto dans les Arts»

**août 11-19** - Semaine festive pour enfants et familles

infos : [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org) / tel: 02 41 89 10 34

<http://www.gresillon.org>

**mars 31 / avril 3 - Paris 13ème** - Centre Kellermann

70ème Congrès de SAT-Amikaro

infos et adhésion: <http://www.sat-amikaro.org>

Krom la ILEI varbilon, ni disdonis specialan dokumenton pri Zamenhof kaj Esperanto, kies lasta parto estas:

«Invitilo al la Ceremonio de la 11a de decembro 2017, Centjariĝo de la forpaso de Zamenhof, Iniciatinto de Esperanto.»

La 5 ILEI-representantoj estis *Jean-Pierre Boulet, Emmanuel Desbrières, Marie-Sylvie Julian, Pascale Voltaire kaj Monique Arnaud*. Tre agema teamo, bonega etoso, tamen ni nepre bezonas anstataŭantojn.

### en Europe

**mai 18-21 - Zweibrücken (Allemagne)**

Congrès franco-allemand-luxembourgeois

En 2018, le congrès annuel français d'espéranto aura lieu en même temps et au même endroit que les congrès annuels allemand et luxembourgeois!

pour voir en ligne :

[http://www.esperanto-sarlando.info/...](http://www.esperanto-sarlando.info/)

**juillet 28 / août 4 - Lisbonne (Portugal)**

103ème Congrès Universel d'Espéranto

infos et bulletin d'adhésion:

<https://www.uea.org/kongresoj/UK>



**août 5-12** - Kragujevac (Serbie): 91a SAT-kongreso

infos et bulletin d'adhésion:

<http://www.satesperanto.org>

*Pro manko de loko, ĉar ĉi tiu gazeto devis esti nur 8-paĝa pro la du aldonitaj dokumentoj, vi ne retrovis la kutimajn rubrikojn: "ZEO-oj en PACA", "Paĝo de la komencantoj" kaj "El la mesaĝkesto de la legataro". Espereble ili enestos la printempan numeron 112.*



# Homo en Universo

*Patrick Lagrange*

**Babilado en Le Beausset la 18an kaj 19an de novembro 2017**

Ĉu Universo? Ĉu Kosmo?

Ĉu Kosmo nur estu la mezurebla parto de la Universo?

Kio estas Universo?

Ĉio kio ekzistas, ĉio kio koneblas kaj exploreblas. Sed ĉu Universo estas ujo? Ĉu Universo kunlimas aŭ senlimas? Ĉar la sciencistoj certas nur pro mezuroj, tiu ago kreas en si mem ekan punkton en la Universo, do la observanto kreas si mem limon en tiu Universo.

Kiel ekkonscii pri la grandeco de la Universo?

La sola scienca ebleco estas mezuri, de la plej proksimeco ĝis la plej malproksimeco!

Ĉu Tero ebenas aŭ sferecas?

Ĉu ni konscias pri nia rapideco ĉirkaŭ la tera akso je proksimume 1 100 km/h (je la latitudo de Le Beausset)? Ne!

Ĉu ni konscias pri nia rapideco ĉirkaŭ la Suno je averaĝe 108 000 km/h? Denove ne!!

Ĉu ni konscias pri nia rapideco ĉirkaŭ la centro de nia Galaksio je averaĝe 900 000 km/h? Redenove ne!!!

Do ni tute ne povas sperti senmovecon en la Universo. Ni spertas senmovecon sur la Tero ĉar ni estas gravite ligitaj al Ĝi. Eĉ se ni vivas tiun senmovecon reale, ĝi estas nur ŝajno laŭ scienca vidpunkto!!!



Unua klopodo mezuri la grandecon de la Tero jam antaŭ 2 300 jaroj: cirkla perimetro 39 500 km anstataŭ la nuna 40 000 km: vere mirige!

Due mezuri la distancon inter la Tero kaj la Luno. Dum la antikveco kaj dum la XVIIa jarcento. Ĉiam pli proksima ol nunaj mezuroj: proksimume 200 000 km anstataŭ la nuna averaĝa 384 000 km!

Trie mezuri la distancon inter la Tero kaj la Suno.

Dum la XVIIIa jarcento kaj dum la transiro de Venuso antaŭ la Suno. Denove pli proksima ol nunaj mezuroj: proksimume 8 000 000 km anstataŭ la nuna averaĝa 149 600 000 km!

Kvare mezuri la distancon inter la steloj. Dum la fino de la XVIIIa, la astronomoj ekkomprenis, ke ĉiuj steloj kaj la Suno estas ĉiuj fonto de lumo, ili certe apartenas al la sama kategorio de astro, do ili ĉiuj lumas same. Do la astronomoj simple komparis la ŝajnan lumecon de la steloj al tiu de la Suno: ju pli stelo malproksimas des malpli ĝia ŝajna lumeco lumas. Pro tiu leĝo, la plej luma stelo post la Suno, Siruso, mezuritis je proksimume 2 lumjaroj (lj) kaj plej mallumaj je proksimume 48 lj (unu lumjaro estas proksimume 10 000 000 000 000 km =  $10^{13}$  km).

Kvine denove mezuri la distancon inter la steloj sed laŭ la konstato, ke proksimaj steloj moviĝas pli amplekse ol la malproksimaj steloj, komparante du bildojn de la ĉielo fotitajn unu sesmonate pli malfrue ol la alia. La du pozicioj de la Tero kvazaŭas niaj du okuloj sed anstataŭ 8cm inter la du la interdistanco kreskas ĝis 300 000 000 km!!! Siruso subite malproksimas je 8,4 lj, ĉirkaŭ 4 oble pli malproksima ol antaŭe mezurita do ĉirkaŭ 16 oble pli luma ol la Suno.

La astronomoj malkovras, ke la diferenco de la ŝajna lumeco de la steloj dependas ne nur de la distanco, sed de ĝia grandeco kaj de ĝia surfaca temperaturo.

laŭ verdecaj steloj (cefeidoj) havas treege regule varian lumon. Ĉar la sciencistoj ekobservis tiajn «kadelojn» en najbaraj galaksioj, ties distanco ekkonatis.

Mirige la distanco de la Andromeda Galaksio kreskis de ĉirkaŭ 60 000 lj en la jaroj 1900 ĝis ĉirkaŭ 3 000 000 lj nun!!!

Lasta klopodo mezuri la grandecon de la Universo : en la jaroj 1925, la astronomo Edwin Hubble konstatis, ke ju pli la bildo de galaksio aspektas malgrande sur foto, despli ĝia lumeco aspektas ruĝe. De tio la plej malproksimaj galaksioj malproksimas je ĉirkaŭ 13,8 miliardoj da lj. Do la plej grandaj distancoj observeblaj ĉirkaŭas:

138 000 000 000 000 000 000 000 km =  $138 \times 10^{21}$  km.

Ĉu tiu grandeco estas tuta Universo aŭ nur parto de

## Astronomiaj distancoj

- Kiom granda estas:
- Nia Sun-sistemo
- Distancoj al la steloj
- Nia Galaksio
- La Universo

Astronomoj mezuras per LUM-JAROJ:

1 lum-jaro = 300,000 km/s x 365 x 24 x 60 x 60 sekundoj =

10,000,000,000,000 km = 10<sup>13</sup> km

Universitato  
de  
Esperanto

multe pli vasta Universo? Ĉu ĝi estas senfina aŭ refaldita sur si mem?

Tiu skafalda mezurado trudas, ke erareteto je la unua ŝtupo iĝas eraregego je la lasta ŝtupo!!!!

Nun pri viv-eblecoj.

Ĉu vivo ekzistas nur sur Tero? Kiel vivo aperas? Kio estas vivo?

La vivo sur Tero estas ĉefe bazita sur kvar ĥemiaj elementoj: hidrogeno (H), oksigeno (O), karbono (C), kaj nitrogeno (N).

Unua rimarko: nur H estas Kosma kreaĵo. La aliaj ĥemiaj elementoj ekeksistas nur post «morto» de steloj, kiuj estas multe pli ampleksaj ol la Suno. Do necese la Suno estas tria generacio aŭ eĉ kvara, kvina kaj kial ne sesa, sepa... generacio de stelo en tiu regiono de la galaksio!!

Ĉar stelo estas kvazaŭ fabrikejo de novaj ĥemiaj elementoj kaj steloj estas ĉie en la Universo, la surteraj konataj ĥemiaj elementoj ekzistas ĉie en la Universo.

Do mirige la sciencistoj konstatas, ke ekde kiam la taŭga energio kunekzistas kun tiuj atomoj, la fundamentaj molekuloj de la vivo kreiĝas sine de nebulozoj. Tio signifas, ke la Tero estus nur ujo, kie la jam ekzistantaj eroj de vivo kuniĝas por krei la nunkonatajn vivantaĵojn!!

Laŭ la malkovritaj fosilioj, la vivo sur Tero ekeksistis de jam 3,8 miliardoj da jaroj. Ŝajne tiu daŭro necesas, por ke homaro ekzistu post apero de likva akvo kaj de oksigeno en la atmosfero.

Jen pri materio. Sed pri pensado kaj cerbumado. Ĉu klarigebla nur pro amasego da interkonektadoj en nia cerbo? Ĉu la informaro estu alia aspekto de nia Universo, kiu ĉeestas samtempe ĉie en Ĝi?

Laŭ tiu lasta vidpunkto, la vivo aperas ekde kiam iu planedo rondiras je taŭga distanco ĉirkaŭ sia stelo por ke likva akvo daŭru. Sed tiu stelo devige ekzistu pli ol 5 miliardojn da jaroj.

En nia Galaksio, ni konas ĝis nun nur nian Sunon. Eĉ se ni supozas, ke po nur unu Suno ekzistas en ĉiu galaksio, ekzistus 5 000 000 000 000 da « Sunoj » en nia Universo, tiom kiom da galaksioj!!! Imagu se po centoj da « taŭgaj steloj » en ĉiu galaksio!!!!

Mi klarigis per aroj da desegnaĵoj ĉe blanka tabulo por riĉigi la interŝanĝojn. Jen niaj interesaj interbabiladoj dum la tuta semajnfino.



*Responsable du fonctionnement de l'Observatoire Astronomique du Mont Chiran pendant 13 ans puis vacataire à l'Observatoire de Haute Provence et au Centre d'Astronomie, vice-président et animateur de la Société Astronomique de la Montagne de Lure, Patrick Lagrange propose des conférences qui ont la réputation d'être claires et compréhensibles par tous, même sur les sujets les plus difficiles.*